## ELDONA AKTIVECO DE ISAE

*Scienca Revuo* estas ĉefa eldonaĵo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Aperas 4 numeroj jare, ekde la 1949-a jaro (nur en la 1961-a la revuo ne aperis), tiel ke por la 1965-a jaro aperis Vol. 16 de la Scienca Revuo. La artikoloj en la revuo estas sciencaj kaj popularsciencaj, el diversaj sciencaj branĉoj, pli ofte originalaj ol tradukitaj. Multaj prelegoj el la Internacia Somera Universitato estas publikigitaj en la revuo, en ĝi ofte troviĝas ankaŭ originalaj esplorartikoloj de eminentaj sciencistoj. Prilingvaj temoj, sciencaj informoj kaj sciigoj de la Terminologia Centro el diversaj fakoj trovas ĉiam sian lokon en la Scienca Revuo.

La jarabono estas 30 steloj, sed por la membroj de ISAE 25 steloj kaj por la junaj membroj (pere de STELO- studenta sekcio) nur 15 st. La abonojn kolektas la delegita reto de ISAE. Administrejo kaj redaktejo ĉe Prof. B. Popović, Zagrebačka 24, SARAJEVO, Jugoslavio.

*Bulteno de ISAE kaj* de ĝiaj sekcioj servas por la plifaciligo de kontaktoj inter la membroj de ISAE kaj ĝia Estraro, same inter diversaj sekcioj de ISAE. Pro tio ĝi aperas laŭbezone, 3—6 numeroj jare (po 4—12 paĝoj). La enhavo estas pure organiza, kun la koncernaj informoj, raportoj, diskutoj ktp. La membroj de ISAE (pagintaj la minimuman jarkotizon, 10 st.) ricevadas la Bultenon senpage.

*Medicina Revuo* estas eldonaĵo de UMEA — medicina sekcio de ISAE Aperas du numeroj jare, tiel ke unu volumo aperas dum du jaroj. Jarabono (por 2 numeroj) estas 15 steloj. En la revuo aperas nur fakaj artikoloj. Adreso: D-ro Masao Suzuki, Fiziologia Instituto, Med. fakultato, Tiba Universitato, TIBA, Japanio.

*Sciencaj Studoj* aperis en unu granda volumo, okaze de la 50-jara jubileo de ISAE. La libro havas 38 sciencajn artikolojn, bazitajn sur originalaj esploroj kaj observoj, verkitaj de konataj sciencistoj el ĉ. 20 sciencaj branĉoj. La libro montras la efektivan uzeblecon de Esperanto en ĉiuj sciencaj kampoj, pro kio ĉiu scienca biblioteko devus posedi ĝin. Krom tio ĝi estas tre malmultekosta: 240 grandformataj paĝoj por nur 50 steloj (25 anglaj ŝilingoj, aŭ la egalvaloro de 3,50 dolaroj).

*Planoj por estonta eldona aktiveco,* dependa de la monrimedoj, enhavas publikigadon de diversaj fakaj libroj, internacie uzataj, instigon al la eldonado de pure fakaj revuoj, pli intima kunlaboro kun la popularscienca serio de STAFETO (aŭ de aliaj eldonontoj) ktp. *La fondaĵo »Scienco«* estas kreita por finance helpi tian aktivecon, pro kio estas grava devo de ĉiu membro aŭ amiko de ISAE subteni la fondaĵon, ĉu per propraj ĉu per kolektataj kontribuoj (la monon transprenas la delegitoj kaj la sekretariejo de ISAE).

*Geografia Revuo* kaj *Kemio Internacia* estas fakaj revuoj ekster ISAE, sed en amikaj kunlaboraj rilatoj ku ĝi, kun la la intenco fariĝi sekciaj revuoj de ISAE.



## EL LA FAKOJ
## SCIIGOJ DE LA TERMINOLOGIA CENTRO DE I. S. A. E.
## (ISAE-TC-118)

(La fakoj estas envicigitaj laŭ la UDK. De nun ni uzos la simbolojn (mallongigojn) por lingvoj denove laŭ la esperantaj nomoj, do *A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala,* ktp.)

55 *Geologio.* — Pri la *Geologia Terminaro* deziras kunlabori *D-ro J. M. Mabesoone,* Escola de Geologia, Caixa Postal 2492, Recife, Pernambuco, Brazilo. Li estas profesoro pri sedimentologio kaj fizika geologio en la Geologia lernejo de la Universitato de Recife.

594 *Moluskoj.* — Plurlingvan *terminaron de Konhologio* (Moluskoj) kun klarigo nur en Esperanto preparas *D-ro M. Glibert* en Bruselo, fama specialisto pri fosiliaj moluskoj (kolego de *S-ro* **W.** *de Smet,* esploristo pri ornitologio kaj ISAE-delegito por Belgio, Drogenberg 36, Overijse, Belgio).

598.2 *Ornitologio.* — La Ornitologia Rondo Esperantista (prez. *W. de Smet)* starigis *nomenklaturan komisionon ornitologian. S-ro Rev. Kenneth Twinn,* M. A., Harrison Parsonage, Atherton, Manchester, Anglujo, redaktis proponitan Nomliston de eŭropaj birdoj, kaj du ekzemplerojn li havigis al la komisionanoj por trastudi kaj fine kundiskuti, por reguligi la nomojn.

621.3 *Elektroteknikо.* — Aperis Pola-Esperanta anekso al la Grupoj 07 *Elektroniko* kaj 08 *Elektroakustiko* de la 7-lingva *International Electrotechnical Vocabulary.* Unua parto: Pl-Eo; dua parto: Eo-Pl, A, F, G, I, Sv. Verkita de *Mag. inĝ. K. Siwicki,* eld. de Pola Esp. — Asocio, Warszawa, 1965, 171p.; 14,6 × 20,5 cm; 937t.; stencilita kun presita kovrilo, broŝurita.

621.9 *Il-maŝinoj.* — En Junio 1965 aperis *Projekto de IL-MAŜINA* TERMINARO (ISAE/TS 8) verkita de *Inĝ. A. Broise* surbaze de la dua eldono (Paris, 1962) de la *Vocabulaire technique trilingue* (F-A-G) par *Pierre Naslin.* Ĉi tiu Projekto prezen-

tas la esperantoterminojn pri il-maŝinoj, envicigitajn laŭ la ordosistemo de la Naslin-vortaro. 186p., 21 × 27 cm, hektogr. multobligita, 920t. kun dif. en Eo, kaj ĉiu el ili kun traduko en F, G kaj A; eldonkvanto 25 ekzempleroj; kelkaj el ili ankoraŭ haveblaj ĉe A. Broise, Brezolles (Eureet-Loir), Francujo.

621.9 *Maŝinfako, il-maŝinoj.* — Pri la kompilado de Il-maŝina terminaro estas preta kunlabori *S-ro L. F. Robinson,* »Tria Domo«, 20 Lime Grove, Alveston, Bristol, Anglujo.

66.084 *Ultrasona provado aplikata en veldado.* — *S-ro Ib Schleicher,*
621.791 *ing.,* Ved Bellahöj 21.13, Kopenhago BRH., Danujo, dum Decembro 1964 sendis al T. C. TERMINARON PRI ULTRASONA PROVADO: Nomenklaturo de la terminoj uzataj en ultrasona provado, kun difinoj en la angla kaj franca lingvoj; eld. de *International Institute of Welding* (*I. I.* W.), French Delegation; 32, Bd. de la Chapelle, Paris (18); Paris, Okt. 1964; 9-lingva (G, A, H, F, Nl, Pl, Sn, Sv, Tk). Raporto Nr. 1964; 6401 de la Dana Akademio de Teknikaj Sciencoj. 71p., U 6401 de la Dana Akademio de Teknikaj Sciencoj. 71p., 21 × 30 cm, 250t. (stencilita). Entreprenis Esperanten traduki la terminaron s-ro *Ib Schleicher* laŭ instigo de kolego, kiu estas elstara dana membro de *I. I.* W. kaj de la terminologia komisiono. Li proponis, ke oni presigu ĝin en oficiala 12-lingva terminaro de la instituto. La direktoro de la »Dana Veldo = Instituto« kiu estas membro de la supera konsilantaro de I. I. W., promesis forte subteni tiun proponon. — T. C. kontrolis kaj korektis la Esperantan vortliston verkitan de s-ro Schleicher, dum Marto 1965.

R. Haferkorn


**Ĉiu scienca biblioteko devas posedi**

la libron

**SCIENCAJ STUDOJ**

**bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj**

eldonita okaze de 50-jara jubileo de

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

sub redakto de

PAUL NEERDAARD

La libro enhavas 38 sciencajn artikolojn **(alie nepublikigitajn)**, verkitaj de konataj sciencistoj el diversaj sciencaj branĉoj:

lingvistiko
historio
juro
muziko
poezio
astronomio
matematiko
geologio
mineralogio
kemio
tehnologio
zoologio
agronomio
medicino ktp.

240 grandformataj paĝoj, prezo 25 danaj kronoj (anglaj ŝilingoj) aŭ 50 steloj aŭ 3,50 dolaroj aŭ la egalvaloro

**Mendebla** ĉe la
Eldonejo **KOKO**, Kolby Kaas. **Danlando**
pere de la librovendejoj, pere de la delegita reto de ISAE, aŭ kun la aldonita banĉeko ĉe la sekretariejo de ISAE al la adreso: Prof. D-ro B. Popović, Zagrebačka 24, SARAJEVO, Jugoslavio.